



SALUTON!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

16 Majo 2005

№ 8

Redaktoro: Araneo

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
FAX: (708) 456-2750

Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer
Vicprezidanto – Karlo Offutt
Sekretario – Viktoro Pajuk
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to:
The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our
Treasurer, Charles Gunn,
828 S. Ada, Chicago IL 60607

Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

En pasinta numero ni jam informis nian karan leganton pri la propono (kaj peto) de ELNA organize sekvantan (aŭ post du jaroj) kongreson de Usona E-organizaĵo sur la terenoj de la Venta Urbo. Ni petis membrojn de la E-societo esprimi opiniojn, sed reeĥis nur du samideanoj. Ankaŭ dum la lasta kunsido oni ne pridisputis la aferon. Sed de dua flanko, ni devas informi ELNA-n ĝis ĉi jara Kongreso en Aŭsteno, kiu komenciĝas la 10an de Junio (vidu anoncon sube). Do, kion ni respondu al la estraro de ELNA?

Kvankam la plej granda spaco de estas dediĉata al la vojaĝo de du niaj klubanoj al malproksima Tanzanio, mi volas proponi al vi, kiel resono de prezidanta vizito de Irano, robajon 23 de renoma persa poeto Umar Kajjam, esperantigita de la franca profesoro G. Waringhien:

Printemp' kaj am-idolo, kiu huriojn spitas,
kaj ĉe herbeja rando min al vinkruĉ' invitas:
nu, estu mi – ne gravas orelojn malrespekti –
de hundoj malŝatata, se mi Edenon citas!

LASTE OKAZIS

La lasta aprila kunsido de E-societo estis tutplene dediĉita al la dek-taga vizito de sinjorinoj Gertrude Novak kaj Tina Seastrom al Orient-Afriko: Antaŭ du jaroj mi (G.N.) – UEA-delegito en Ĉikago – ricevis surprizleteron de s-ro Mramba Simba el Tanzanio kun la temo: vizito de usona E-isto. Li ja estas E-isto, kiu parolas IL-on kaj sŭahilan, sed tute ne komprenas la anglan – lingvon de Pac-Korpuso, organizaĵo, kiu helpas al afrikaj infanoj kaj mon-subtenas evoluon de afrikaj vilaĝoj. Oni fakte bezonis interpretiston por komunikado inter Pac-Korpuso kaj la loka organizaĵo *Zinduka* (Vekiĝu!).

La 10-taga vizito de novjorkano Brian Springer komence de aprilo donis al ni okazon ekvidi Tanzanion kaj fake traduki Esperante-angle. Preparado rezultigis en kvar pezegaj valizoj, plenŝtopitaj per mediciniloj, edukaj kaj lernejoj materialoj, libroj kaj Esperantaĵoj. Ni flugis tra Amsterdamo al Kalimanjara flughaveno en Moŝi', norda Tanzanio. Venonttage ni veturis pere de private kamioneto al Njamusŭa, kiu situas apud la lago Viktorio. Ni laŭvoje havis plezuron sperti sovaĝvivon de la ebenaĵo Serengeti kaj per propraj okuloj ekvidi leonojn, ĝirafojn, guojn, strutojn kaj multajn aliajn.



Surloke nin renkontis nia gastigonto Simba, kiu tuj konatigis nin kun la tuta programo de nia vizito. En Njamusŭa estas elementaj lernejoj kaj unu mezlernejo, ankaŭ malsanulejo, vilaĝ-domo. Mirigis nin ŝtona fun-

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;
toll free: 1-800-ESPERANTO
(1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/valangla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/poll1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

24an de Majo – nia fora ano
Marko Ŝafrot gvidos nin tra la mondo de Mefisto

22an de Junio – temo anoncota, prelegonto serĉata. Dezirantoj, reeĥu tuj!

27an de Julio – okazos distance klubkunsido en Vilno, Litovio. La loko jam estis rezervita en la Kogresejo.

NOTU! ELNA-Kongreso 2005 okazos en Aŭsteno, Teksaso de la 10a ĝis la 13a de Junio. La oficiala kongresa retpaĝaro jenas:
<http://kongreso.hewgill.com>

damento por Zinduka E-centro kaj senlima gastigeo.

Sekvanttage oni kondukis nin al granda mangujo (vd. foton supre), kie junulo instruis abocon por antaŭ-lernejaj infanoj. Dum kelkaj horoj ni partoprenis instruproceson, sed poste ekis al la malgranda loka kliniko, kie atendis nin kuracisto. Por li ni veturigis la tutan pakaĵon de antaŭe menditaj kuraciloj. Estis aranĝita speciala akcepta kaj dankesprima ceremonio: oni sidigis nin ĉe ornamita tablo sub la provizora tegmento, apude sidis distrikta oficiro kaj la vilaĝestraranoj. Vilaĝanoj staris, sidis sur seĝoj aŭ surtere sub proksimaj mangoarboj. Post parolado ĉiu aparta speco de medicina ekipaĵo estis montrata al la publiko. Reciproke ĉeestantoj donacis al ni *kankas*-on – tradician virinan tolvestaĵon. Tio fakte estis la plej granda kunveno en historio de la vilaĝo!

Pli granda kuracilaro estis donacita poste al la san-centro de Njamusŭa. Ĉiun posttagmezon ni pasigis en la mezlernejo, kie por 28 entuziasmaj lernantoj (dum vakacioj!) ni instruis IL-on. Tiu klaso estis speciale organizita fare de Simba. La lernintoj ŝategis kvizojn, ĉar premiitoj ricevis E-insignojn. Por infanoj Tina flut-muzikas Esperante (foto apudas).

Simba montris al ni, kie li esperas konstrui E-centron. Oni jam kolektis rokojn por fundamento, sed konstruado mem dume bremsas pro la manko de mono por brikoj kaj cemento. Venontjare oni planas organizi tie la E-kunvenon. Fakte la tutnacia E-asocio de Tanzanio ĉesis sian funkciadon pro la sama manko de mono. Ankaŭ stagnas E-aktiveco en proksima urbo Bunda. Simba, do, klopodas fondi E-centron de la norda Tanzanio.

Ni ankaŭ kuraĝigis Simba-n (per mono por ŝtofo) denove okupiĝi pri sia malnova profesio de tajloro. Tiel li povus pli rapide gajni monon por realigi sian celon – konstruado de E-centro. Kaj nia E-societo, sciante pri kadukeco de Simba biciklo, aĉetis por li la novan. Poste evidentiĝis, ke iu ulo prunteprenis lian malnovan radmaŝinon kaj falinte fine ruinigis ĝin. Do, nia donaco estis alloka kaj ĝustatempa. Por retumi nia amiko devas bicikli al urbo Bunda, kovrante distancon de 34 km!

Resumo: ni trovis Simba-n kaj liajn kunlaborantojn sincersaj, honestaj, boncelitaj kaj helppretaj. Gesamideanoj, kiuj volas kontakti lin kaj eble subteni, jen estas liaj donitaĵoj: s-ro Mramba SIMBA, ab. k. 51, Bunda, Tanzanio; tel. + 255-0745-076-596; rete: smbmramba@yahoo.com.

Doktorino kaj Tina



Anoncetoj

ATENTON: la sekvanta kunsido de nia societo okazos **marde, la 24an de Majo**, en la sama loko kaj je la sama tempo.

Al la Vilna UK jam aliĝis 1966 personoj el 60 landoj, inter kiuj – tri membroj de nia societo. Dum UK estas planataj renkontoj kun la samideanoj de niaj ĝemelurboj por starigi duflankajn rilatojn.

Denove kun vi estis  araneoesp@yahoo.co.uk